

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 62 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 aŭgusto 1925

MORE "WIRELESS."

An extremely powerful station commenced operations in June in Madrid. The director has promised to transmit a large amount of Esperanto. "La Suno Hispana" says, "on account of its extraordinary power, greater than that of any other European station, its programmes should be heard throughout the world."

The Leipzig Radio Station broadcast the opening speeches of the German Esperanto Congress held at Magdeburg on 31st May. The speeches were conducted by microphone to a telephone line which was connected to the broadcasting station.

Twelve British stations broadcast the opening proceedings of the last British Esperanto Congress. Lord Robert Cecil, vice-president of the League of Nations, D-ro Privat, professor J. J. Findlay, and s-ro C. H. Edmonds were the principal speakers.

As a result of the recent Congress of Radio Amateurs in Paris a committee has now been formed to organise contact between the amateurs of Europe, to arrange experiments and to utilise the results thereof. The official organ is the "Radio Amator," 20 Zielna, Warsaw, which will, practically, be wholly printed in the language of the Radio amateur—Esperanto.

PITH OF RECENT CONGRESSES.

During the recent Danish Congress members visited Brandekilde, the birthplace of the famous linguist, Rusk. At the monument erected in his honour they placed a floral tribute inscribed, "To the famous son of Denmark, Rasmus Kr. Rask, who advocated an auxiliary international language."

The Sixteenth British Congress was held at Leamington, under the presidency of Prof. J. J. Findlay. Viscount Cecil sent a message to the Congress which was broadcast. It was definitely decided that the 1926 international Congress would be held in Edinburgh. The British Esperanto Association is co-operating with the Linguaphone Institute in the preparation of Esperanto gramophone records. The recording has been done by Dr. Edmond Privat. The records will include lessons, extracts from Esperanto literature, speeches, etc. It was decided to organise an Esperanto month in Great Britain and to invite s-ro Ĉe to make a propaganda tour.

The German Congress at Magdeburg was a great success. Radio played a great part, the proceedings being extensively broadcast. During the opening day telegrams were received from many parts of Germany reporting that the speeches had been so distinctly heard that the proceedings were able to be closely followed.

INSTRUU LA INFANOJN.

Rigardante la neageman eĉ kontraŭstareman sintenadon de la ŝtata kaj aliaj edukadaj aŭtoritatoj pri ia ajn internacia lingvo oni iam malesperas pri Esperanto. Pro kio tiuj timas? Jam multaj geinstruistoj en ĉiu ŝtato lernis esperanton, ja, kelkaj gajnis la britan diplomon. Ĉiuj konsentas, ke nia lingvo vere estas helpilo en lernejoj instruadaj temoj. Ĉu estas eble starigi eksperimentan kurson inter infanoj en iu urb-lernejo? Saĝe estus fari tion por montri al la nekredantoj kiel facile infanoj povas lerni, ankaŭ kiel utila estas la lernado faciligante la studadon de iuj anglaj temoj. En Anglujo, ĉe Eccles, oni faris tian eksperimenton kaj la rezultato pruvis, plej konvinke, ke la lingvo ne nur estas akceptinde sed ankaŭ vere necesa. Antaŭ la lasta Aŭstralia kongreso, sindonemaj esperantistinoj, kiuj ankaŭ sin okupadis kiel ŝtataj lernejoj instruistinoj, instruis ĉirkaŭ kvar-dek infanojn. Tiuj infanoj studadis kaj rapide lernis Esperanton tiel, ke ili prezentis teatraĵojn antaŭ la kongresanoj. Tiu prezentaĵo estis bonege sukcesplena. Post tio la infanoj daŭrigis la studadon kaj nuntempe la plimulto el ili, korespondas kun infanoj de diversaj landoj, kaj samtempe vigle faras siajn lecionojn ordinariajn. Post kelke da jaroj ĉi-tiuj infanoj povos uzi la internacian helpingvon por korespondi komerce kun alilandanoj tiel, ke ili povos plibonigi siajn vivrimedojn. Ankaŭ ili povos havigi al si la plej legindajn verkojn el ĉiuj landoj, kiuj ĝis nun, por ili ne havas ian ajn valoron. Do, kial ne instruu ĉiujn infanojn el tuta nia lando? Kial puni la estantajn infanojn, kaj ankaŭ la estontajn? Kial niaj infanoj ne havu la saman oportunaĵon kiel tiuj de eŭropaj landoj? Por komenci la instruadon Esperantan oni sugestis ke unu du instruistoj ĉe ĉiu ŝtata lernejo starigu kurson dum lernejoj horoj—kompreneble nur se la ministro por edukado permesos tion. Certe troviĝos instruistoj kiuj ĝoje faros tion je la fino de la lernejoj horoj. Oni raportas ke jam kelkaj samideanoj gvidas kursojn inter la infanoj. Kun plezuro la la Suda Krucoricevos raportojn pri tiuj klopodoj.

RESUMO PRI MIAJ ĜISNUNAJ TRAVIVAĴOJ EN NOVA GINEO.

(de Lauri Laiho).

En la frua mateno la 26an de Junio nia ŝipo "Mataram" envelveturis la havenon de Rabaul. La vidaĵo, kiam oni envenas de la maro post naŭ-taga unutona vivado sur vaporŝipo, estas pitoreska; Rabaul troviĝas en kurbaĵo de golfo, en la valo de tri vulkanoj. La vulkanoj ne funkcias jam de longa tempo, sed malfortaj tertremoj estas tre oftaj (ankoraŭ ne okazis iu dum mia ĉeesto), kaj de la pinto de la plej alta eliĝas de tempo al tempo malagrabla haladzo de sulfuro.

Rabaul estas la ĉefurbo de Mandata Teritorio de Nova Gineo, nun sub la rego de Aŭstralio (antaŭ la milito ĝi apartenis al Germanujo). La urbo kuŝas ĉe la nordo pinto de insulo Nova Britujo. La civilizita loĝantaro konsistas el 500 blankuloj, krom tiuj loĝas en la urbo ĉirkaŭ 1,000 da ĉinoj, kaj nekalkulebla nombro da indiĝenoj, plejparte kanakoj kaj melanesianoj.

Mia venonta mastro estis ĉe la ŝipbordo kun sia nigra kanako kaj aŭtomobilo, kies direktisto estis malaja. Ni veturis rekte al nia loĝejo, kiu troviĝas en distanco de 10 min. de la urbo. La loko estas la plej bona en la ĉirkaŭaĵo, ĉar starante sur la pinto de monteto (ne tamen unu el la vulkanoj, kvankam tre proksime al tiuj) tie ĉiam ekzistas iom da trafluo kaj blovo, tiel ke la varmego ne ĝenas egale al tio malsupre en la urbo. Pro tio la loko estas okupita plejparte nur de respektataj urbanoj, kaj nomata aristokrata antaŭurbo Namanula.

Mia plej unua okupo estis vizito al ĉina tajloro por mendi kelkajn blankajn vestaĵojn, kiujn viroj ĉi tie ekskluzive uzas. Ordinare oni vestas sin tage nur en pantalonoj kaj ĉemizo, vespere kaj kiam oni faras vizitojn, oni surmetas ankaŭ blankan jakon. La vestaĵo do ne estas peza.

La loĝejoj estas malpezaj, sur unumetraj kolonoj konstruitaj bangaĵojn la kruirejo kaj banejo ordinare en aparta konstruaĵo. La kanakoj faras ĉiun laboron: purigas la ĉambrojn, kuiras la manĝaĵojn kaj lavas la vestojn, kiu lasta okupiĝo certe ne estas malgrava, ĉar la mastro de-

mandas ĉiumatene puran ĉemizon kaj preskaŭ ĉiu-tage ankaŭ paron da amelumitajn pantalonojn. La fizika flanko en la vivmanieroj de blankuloj en tropiko estas nepre pura, kiun saman oni ne ĉiam povas diri pri la morala flanko.

La drinkejoj en la urbo estas malfermataj ĝis malfrua vespero, kaj ankaŭ multe vizitataj. Plejmulto el la homoj ĉi-tie havas emon drinki alkoholaĵojn, eĉ doktoroj rekomendas trinki botelojn da biero ĉiu-tage. Sed tio ne sufiĉas; ekzistas homoj, kiuj drinkas dek botelojn da biero kaj unu botelon da viskio ĉiutage. Mi ankoraŭ ne alkutimiĝis eĉ al la doktora ordono; ankaŭ la kininon mi ankoraŭ ne komencis ĝui.

La homoj ne multe promenadas en tiu ĉi lando: preskaŭ ĉiu dua homo posedas aŭtomobilon. Ordinare oni veturas per aŭtomobilo sabatvesperon al iu plantejo de konatulo, kaj revenas malfrue en la dimanĉo. La lastan sabaton mi veturis en la lokon nomata Kokopo, en unu horo distanco de Rabaul, por renkonti mian karan samideanon s-ron Maŭrice Hyde—kiu preterdirante estas la plej lerta esperantisto en la suda duonsfero—kun kiu mi pasigis la du tagojn tre agreable. Pitoreska loko: mi admiris la sunleviĝon de la balkono de mia hotelo inter belaj palmoj. Estado en tia hotelo en Eŭropo estus multekosta. De tie ni veturis al plantejo, kie estis aranĝita Sing-Sing, festa danco de indiĝenoj, kiun partoprenis ĉirkaŭ 200 paganoj, vestitaj en kuriozaj kaj amuzaj ornamaĵoj. Ili konsistis el kanakaj, melanesianoj, negrojn de Solomon insuloj, kanibalojn k.t.p. Tiuj du tagoj estis simple grandiozaj al mi: pitoreskajn pejzaĝojn kien ajn oni rigardis, tropikajn kreskaĵojn, belegajn turistajn vojojn tra palmo-arbaregoj ĉe la marbordo. Tromulte por unufojo!

La naturo ĉi tie estas tute mal simila al tiu en Aŭstralio: sekeco neniam ĝenas. Nun devus esti la

seka periodo, sed pluvetas preskaŭ ĉiu-tage. Nenia strata lumigo, ekzistas, sed kiam estas lunlumo, oni ne deziras ion plu, tiel bela kaj luma ĝi estas. Ekzistas alia natura lumigo ankaŭ, tiu de lumomuŝoj, kiuj kelkfoje povas aperi en miloj. La suno leviĝas mirinde bruleflava je la sesa horo kaj malleviĝas preskaŭ je la sama horo vespere.

La blankuloj ĉi tie estas plejmulte oficistojn por aŭstraliaj oficejoj kaj plantejoj. Ekzistas ankaŭ kelkaj privataj plantejoj, i.a. unu plantejo de kokosa palmo, posedata de finno; mi ne konatiĝis ankoraŭ kun la viro, kiu laŭdire estas edzigita kun duonkolora virino. La virinoj (blankaj) ne estas tre multnombraj en la loko, kaj tiuj malmultaj estas preskaŭ senescepte edzinoj. Cetere mi kredas ke tia ŝanĝo estas bona por juna viro: iom seriozigas . . .

NOVA LIBRO DE NITTI.

Sametempе kun la aliaj ĉirkaŭ 15 nacilingvaj tradukoj de la plej nova verko de Francesco Nitti, (iama ministrara prezidanto itala), speciala Esperanto-eldono aperos sub la titolo "La Paco," (aro da paroladoj faritaj en Skandinavio kaj en Svislando). La tradukaj laboroj nuntempe estas farataj rekte el la itala originalo de du lertaj esperantistoj. La diplomato kaj pacifisto mem instigis la eldonejon de la Frankfurter Societats-Druckerei, Abteilung Buchverlag, Frankfurt, fari specialan Esperanto-tradukon, por kiel eble plej rapide konatigi siajn ideojn al la tuta mondo.

SUPERFLUE.

Sinjinorino, al la nove dungita kuiristino: "Ĉu vi lavis la fiŝon antaŭ ol vi kuiris ĝin?" "Ne, sinjinorina moŝto, pro kio lavi ĝin? Ĝi ja pasigis sian tutan vivon en la akvo!"

HAROLDO PUDNEY.

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Asocio" kiu havas Esperantan fakon ĉe Hawthorn, Viktorio, renkontiĝis por ĝui muzikan vesperon je la 15a julio.

La programeroj konsistis el kan-toj, violonaj soloj, amuzaj konkur-soj, dancado, k.t.p., kaj ĉiu ĉeestanto, ŝajne, tre ĝuis la diversajn erojn. Ĉirkaŭ dudek kvin ĉeestis.

KOMISIONO PRISENDANGERO KAJ INDUSTRIA HIGIENO.

La internacia Komisiono pri sen-dangero kaj industria higieno havis sian unuan kunsidon en la Interna-ia Laboroficejo en Genevo, la 9—11 majo. Ĝi kunvenigis spertulojn el Belgujo, Francujo, Germanujo, Gran-da Britujo, Italujo, Nederlando kaj Svisujo.

La Komisiono ekzamenis problem-ojn de industria sendangero nur ĝis kiom ili rilatas al industria entre-preno, doko kaj konstruado, ne en-kalkulante minojn, transportadon ka, agrikulturon.

Oni diskutis pri la redakt sur in-ternacia bazo de studoj pri kelkaj problemoj rilataj al la antaŭforigo de akcidentoj. Oni opiniis, ke tiaj stud-oj multe helpus al progreso je antaŭrimedoj kontraŭ akcidentoj.

La Komisiono balotis rezoluciojn pri la enkonduko en nacian leĝdonon de la principo de industria sendan-ĝero, pri punoj por neobservo de regu-loj starigitaj tiacele kaj pri kun-laborado de la diversaj organizaĵoj sin okupantaj pri asekuro kaj antaŭforigo de akcidentoj.

La membroj de la Komisiono vizi-tis, gvidate de s-ro Tzaut, direkto de la Svisa Nacia Akcidentasekura Kaso, du fabrikejojn en Genevo, por vidi la metodojn uzatajn por sin protekti je ligno-ellaboranta maŝinaro.

—Informservo de la Internacia Lab-orficejo.

MORTO DE FAMA LINGVISTO.

Antaŭ kelkaj semajnoj mortis en Takoma (Vaŝingtono) profesoro Karl J. Arnell, kiu ellernis 53 lingvojn. Krom la mortintaj lingvoj de la mon-do li sciis la vivantajn, komence de la lingvo de eskimoj kaj finante per tiu de afrikaj hotentotoj.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Laŭ nova pro-gramo por la sekvanta jaro, la anoj de la Melburna Esperanta Societo ĝuis la jenajn erojn dum la pasinta monato. Julio 17. Post la kutimaj aferoj de la grupoj, la klubanoj ra-kontis amuzajn anekdotojn, por hel-pi la pli fluan paroladon de la ling-vo. Julio 24. Ĉi tiun nokton oni hazarde elektis la nomojn de kelke da ĉeestantoj, kiuj poste mallonge parolis pri temo, mem-elektita. Sen-dube la afero donis bonan okazon ek-zerci sin en la parolado antaŭ aliaj. Julio 31. Oni kantis, unuope kaj an-kaŭ kune, sekvis deklamoj kaj pluaj kantoj. Vere belsonaj estas la Es-perantaj kantoj.

SIDNEJO, N.S.K. — Por lia kvara radio-parolo, ĉe stacio 2FC, la 28an Julio, S-ro Pfahl elektis paroli pri "Internacia Reklamado per Esperan-to." Pro justatempa vizito de la Usona militŝiparo la parolinto invit-is Esperantistajn marsoldatojn al la klubejo.

Oni raportas, ke antaŭaj radio-paroloj estis bone auditaj ne nur en Nova Sud-Kimrujo, sed ankaŭ en Viktorio kaj Novzelando.

Notinda parolado dum pasinta monato estis "Historio de Sidneja Esperanto-Societo" de la prezidanto, S-ro F. V. Taylor, kiu zorgoplene preparis la historion depost la jaro 1909, antaŭ ol nenio estas definitive konata. La historio, kune kun do-kumentaro, nun estas konservata kaj oni penas kompleti la kolektradon pri la fruaj tagoj de Sidnejaĵ agadoj.

Pro neantaŭvideblaj cirkonstancoj la Sidneja societo ne transloĝiĝis al la adreso lastmonate avizita, sed al "Rawson Chambers," Rawson Place, ĝuste kontraŭ la malnovaejo.

PERTH, W.A. — Korespondanto skribis dirante, "Ni havis kurson, sed pro malsano kaj aliaj malhelpaĵoj ĝi ĉesiĝis." Sendube, la ĝis nun aĝem-aj samideanoj post nelonge starigos aliajn kursojn kaj grupojn.

HOBART, Tas. — La jara kunveno havis lokon la 14an de julio. La rutinaj aferoj ricevis atenton kaj oni elektis la sekvantajn oficistojn, Prezi-dantino, F-ino C. M. Hannaford, Sekretariino, F-ino A. Beckett.

HAWTHORN, V. — La anoj kaj gastoj de la "Katolika Internacia

HERE AND THERE.

M. Leon Poncet obtained his medical degree recently for a thesis on "Vaccination for Typhoid and Cholera." Dr. Poncet obtained all his information through the medium of Esperanto. He wrote to the U. E. A., delegates of several countries, (including Mr. Ballard, chief delegate in Australia) and they obtained the latest information from official sources and forwarded it. The examiners enthusiastically expressed their appreciation of the value of Esperanto and determined to recommend its further use in medical literature.

An old time Esperantist, Mr. C. W. T. Reeve, who became an advocate for Ido has made an application to be again admitted to membership of the British Esperanto Association. In explanation Mr. Reeves says that contrary to his expectation the improvements represented in Ido have not helped towards the adoption of an international language. That and other systems do not afford the traveller and correspondent the opportunities to demonstrate to so full an extent the possibilities of an artificial language as does Esperanto which is now so widely known. He says that Esperanto has proved itself to be nearly the very artificial language the public want, supposing that they want an artificial language at all. The capacity for expansion and improvement of Esperanto should satisfy individuals who are enthusiastic for improvements. It amounts to this—we must go abroad and use the language, and use it again and again by writing in it on subjects of every day concern.

The "Oficiala Jarlibro de la Esperanto Movado, 1925," (U.E.A. Yearbook), has now reached members. It contains much valuable information.

STENOGRAFIO POR ESPERANTISTOJ.

De stenografiistino el Nederlando ni ricevis la jenan sciigon: La delegito de UEA en Dordrecht, -ro B. P. Roubos baldaŭ sendos en la mondon novan stenografisistemon por Esperantistoj. La sistemo estas neŭtrala. Ĝiaj signoj estas elektitaj laŭ la idiomo Esperanta. Petantoj ricevas senpage la unuan lecionon kun bezonaj informoj.

ESPERANTO DESIRED IN SCHOOLS.

Early last month a deputation waited on the Minister for Education of South Australia, with a request that Esperanto be taught in the public schools of the State. The Rev. B. Wibberly and Rev. A. C. Stevens, on behalf of the C.O.P.E.C. Association, urged the claims of Esperanto and the Hon. P. McM. Glynn, a former Minister in the Federal Government, Messrs. Waterman and Urhlaub, well known Esperantists, and Mr. R. B. Caldwell, president of the Wireless Association, each advanced arguments in favour of the request being granted. The Minister, in reply, said that the deputation had given him much information. He would consult the Director of Education in the matter, he himself could not say whether the introduction would be advisable. He suggested a deputation to a Federal Minister, and implied that he was not in sympathy with the request.

"C.O.P.E.C." FAVOURS USE OF ESPERANTO.

The following resolution was submitted to the recent conference of this movement, (Conference on Christian Politics, Economics and Citizenship), by the International Relationships Study Circle was carried unanimously:

(a) That the C.o.p.e.c. movement in South Australia will support a request, representing the whole of Australia, urging the Federal Government to petition the League of Nations to approve of an international Auxiliary Language and to name a date when it will be adopted in all debates.

(b) That the Executive be authorised to take action to give effect to this resolution.

It is suggested that instead of approaching the Federal Government a petition to the Federal Parliament should be circulated for signature throughout Australia. The General Secretary, Mr. J. Charles Genders, Town Hall Buildings, Pirie Street, Adelaide, would be glad to get in touch with all who are interested in the adoption of an international auxiliary language. Secretaries of groups in Australia and New Zealand would help by sending information and suggestions to Mr. Genders.

bro pri la telefona reto de Paris eĉ ne enhavis cent abonantojn, kaj kiam oni atendis, instaligi aparaton ĉe si, ĝis kiam la aliaj estus komencintaj.

Nu bone! La samaj hezitoj markis la komencojn de Esperanto; sed de post kiam ĝi eniris la mediojn, kiuj havas praktikan intereson nepridiskuteblan por ĝin utiligi, ĝiaj progresoj fariĝis rapidaj.

Jam la komerco eksporta kaj importa ne havas la rajton ignori ĝin; ĝi baldaŭ fariĝos same necesa por ĝi kiel la telefono.

Jen kion komprenis nia iama prezidanto s-ro Pascalis, kiam li esplorigis antaŭ kvar jaroj la demandojn pri helpa lingvo

Mi jen vidas kompetentajn reprezentantojn de komerco kaj industrio, alvenintajn el ĉiuj punktoj de la mondo. Mi salutas en ili la delegitojn de 155 komercaj ĉambroj kaj sindikataj ĉambroj aŭ industriajn firmojn apartenantajn al 32 diversaj landoj.

Tiu diskutoj, kiuj okazos en unu sola lingvo inter la reprezentantoj de 32 nacioj, estos denova rimarkinda demonstracio pri tio, ke estas finigonta la epoko de internaciaj kongresoj, kie la diskutoj bezonigantaj multenombrajn interpretistojn estas tiom penigaj.

S-ro Leonard, parolante en Esperanto, informis ke la ministro de komerco ĵus rekonis Esperanton kiel klaran lingvon por internaj telegrafaj rilatoj, kaj ke la registaro proponos la samon por la internacia telegrafa uzado dum la proksima Konferenco de Internacia Poŝta Unio.

LA AKCEPTO ĈE "LES ECHOS."

Parolado de D-ro Fruictier, sekr. de "Les Echos":—Karaj samideanoj mi ne volas paroladi longe: vi certe jam aŭdis multajn paroladojn pli lertajn ol la mia kaj mi timus tedi vin, ripetante sennecese tion, kion aliaj jam diris al vi. Tamen, mi deziras insisti pri unu punkto, kiu rilatas al la propagando kaj estas laŭ mia opinio aparte grava. Tio estas, ke, se ni volas ke nia movado sukcesu, ni devas senlace pruvadi al la mondo, ke Esperanto estas ne nur uzebla aŭ uzata, sed uzinda. Kaj per tiu vorto "uzinda" mi celas, ke ni devas elpruvi al la indiferentuloj, ke ilia tuja, materiala intereso estas lerni

INDUSTRIALISTS CONFER IN PARIS.

This Conference was a remarkable demonstration in favour of Esperanto. It is a matter for regret that, through lack of space, the merest summary of the proceedings can be given. It was decided to endeavour to introduce the instruction of Esperanto, first as an optional subject, then as obligatory, in scientific and technical schools; to petition the League of Nations to actively advocate it; to recommend all societies to have classes in their schools, to print articles in or about Esperanto in their publications; that they adopt Esperanto as a language to be used at congresses. International organisations, official and otherwise, are requested to use Esperanto in their offices and for correspondence, and after successful use to ask their governments to also use Esperanto. Publishers, especially those issuing scientific and technical periodicals, are requested to issue Esperanto editions of valuable articles, to use Esperanto in their commercial affairs and to facilitate the publication of the documents of the Esperanto Science Association. Scientists technicians and industrial firms and associations are asked to require their staffs to learn Esperanto to themselves use it in their foreign correspondence and to state on their letterheads and envelopes that they use Esperanto. Well thought out means to attain these ends were in each case suggested and fully explained.

ELTIRAJO EL PAROLADOJ.

S-ro Kempf, prezidanto de Komerca Ĉambro de Paris, okaze de la malferma kunveno de la Komerca Kongreso diris:—

La intereso, kiun Esperanto prezentas por la internacia komerco, estas konsiderinda, ĉar tiu ĉi lingvo permesas, je prezo de minimuma peno, korespondi ne nur kun aĉetantoj aŭ vendantoj de unu sola lando, sed kun ĉiuj merkatoj de l'mondo.

Tiu ĉi lingvo, estas vera kodo de korespondado kaj de lingvaĵo internacia. Jen nova rimedo, kiu povas doni grandajn servojn sub la kondiĉo, ke ĉiu faru la malgrandan penon necesan por ĝin lerni. Sed mi rememoras pri la tempo, kiam la jarli-

kaj uzi Esperanton. Mi estas jam malnova esperantisto—mi tute ne fieras pro tio ĉi—sed ĉar mi lernis la lingvon jam antaŭ dudek kvin jaroj, ĉar mi partoprenis en la klopodoj de niaj plej famaj pioniroj, ĉar mi vidis la supreniradon de nia lingvo post nia unua kongreso en Bulonjo kaj—bedaŭrinde—la malsupreniron post la disiĝoj, kiuj aperis inter ni, mi hodiaŭ konkludas, ke la sola rimedo altiri al ni la indiferentulojn kaj reteni ilin en niaj vicoj estas, disvastigi nian lingvon antaŭ ĉio inter profesiaj fakuloj por tuj doni al ĝi praktikan utilecon. Sendube la ĝenerala propagando estas necesa; krei propagandajn grupojn, malfermi ĝeneralajn kursojn, organizi kunvenojn, festojn, korespondadon, interŝanĝadon de ilustritaj poŝtkartoj, ktp. estas bonege. Sed tio ne sufiĉas: se ni ne organizas nian aferon tiamaniere, ke Esperanto efektive servu tuj al tiuj, kiuj lernas ĝin, fatale venos tago, kiam la entuziasmaj malvarmigis, la personaj disiĝoj aperos, la gramatikaj aŭ vortaj disputoj naskiĝos, kaj la plej fervoraj partianoj de nia afero senkuraĝiĝos kaj forlasos nin.

Tial, karaj, samideanoj, mi kredas, ke la estonto de nia afero dependas de nia sukceso inter la fakuloj. Tie ĉi, ni estas inter komercistoj: ni do estas ĉiuj praktikaj homoj, kiuj kompreneble havas ankaŭ sian idealon, sed antaŭ ĉio devas, difine perlabori sian vivon. Se oni diros al ni kaj al niaj kolegoj tra la tuta mondo: "Lernu Esperanton por la bono de l' Homaro kaj de la venontaj generacioj!" tre certe kelkaj sindonemuloj aŭskultos tiun parolon kaj aliĝos la movadon, sed ili ne estos multaj kaj ilia fervoro ne povos daŭradi ĉar, kiel vi scias, komercisto ne havas multe da tempo dediĉebla al alia afero ol lia komerco, kaj vole nevole tiun ĉi aŭ alian tagon liaj profesiaj zorgoj devigos lin forlasi la propagandon. Sed oni pruvu al ni, ke per Esperanto ni povas tuj trovi klientojn, ŝpari je la presado de katalogoj, malmultigi niajn tradukajn elspezojn, pli facile trovi eksterlande la komercaĵojn, kiujn ni bezonas, unuvorte—ŝpari tempon kaj gajni monon. Ĉu vi ne kredas, ke ĉiuj komercistoj, vidinte tion ĉi, ne rapidos lerni la lingvon aŭ almenaŭ ne ordonos al siaj helpantoj lerni ĝin, por elteni la konkurencon de siaj pli progresemaj esperantistaj kolegoj?

Tial, karaj samideanoj, mi diros al vi en la fino: ni, komercistoj, ni, praktikuloj, ni devas doni al ceteraj fakuloj, al scienculoj, al laboristoj, al policistoj ktp., kiuj jam fake organizis sin por la disvastigo de Esperanto, la ekzemplon: ekzemplon de praktika, efika organizado, ekzemplon de tuja kaj ĉiama uzado de la lingvo por niaj profesiaj celoj, ekzemplon de senlaca persona propagandado inter niaj samfakuloj tra la tuta mondo. Se el la nuna internacia kongreso vi returnas hejmen kun tia decido en via volo, mi ĝoje povos diri, ke Esperanto faris novan grandan paŝon antaŭen sur la vojo al triumfo!

OUR SUPPORTERS.

S-ro A. R. Cohen: "My interest remains wish you every success."

Miss A. Ryan, State School, Silkstone, Queensland: "I hope this link with scattered members may continue."

S-ro N. Gaye: ". . . . my subscription enclosed, with best wishes."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ĉi tiu adreso — "La Suda Krucio," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, Australia."

Amikeco, 5; Arbeider Esperantisten, 5; Austria Esperantisto, 6; Belga Esperantisto, 121-122; British Esperantist, 243; Brazila Esperantisto, 1/3; Bulgara Esperantisto, 8, 9; Inform-servo de la Internacia Labor-Oficejo, 91c, 91d, 93b, 93c; Bulteno Antverpena, 5, 6; Esperantista Junularo, 26; Heraldo de Esperanto, 37 ĝis 47; Hungara Esperantisto, 74; International Language, 5, 6; Le Monde Esperantiste, 138; Oomoto, 5; La Ora Epoko, 12; La Progreso, 6-7; La Revuo Orienta, 5; La Suno Hispana, 97; La Unigita Tuthomaro, 5, 6; Literaturo, 26; Pola Esperantisto, 4; Svenska Esperanto Tedningen, 5.

Nokte venis el gastejo ebrulo kaj demandis fremdulon irantan sur la strato, ĉu tio estas la suno aŭ la luno, kiu lumas sur la ĉielo. La fremdulo diris: "Pardonu, sinjoro, mi ĉi tie mem estas fremda."

ALVOKO AL NOVZELANDAJ ESPERANTISTOJ.

Probable kelkaj el la NZaj. abonantoj de "La Suda Krucio," jam scias pri mia peno revivigi la Novzelandan Esperanto-Asocion. Nuntempe mi estas okupata per la kolekto de nomoj kaj adresoj de ĉiuj, kiuj, estas interesataj en nia kara lingvo, ĉar tio ĉi estas la unua kaj plej urĝa paŝo.

Per tiu ĉi alvoko mi petas al ĉiu, kiu ne estas ricevinta mian antaŭe disdonitan cirkuleron, kiel eble plej frue, sendu plenan liston de konatuloj al mi. Antaŭan dankon. Wm. H. King, Postal Division, Secretary's Office, G.P.O.. Wellington, N.Z.

SUBSCRIPTIONS.

Up till 31st July the following sums were received:—Cash sales, 8d.; C. L. Clarke, 4/6 (6/26); B. K. Blyth, 5/- (7/26); Group "Espero," 5/- (7/26); J. G. Roberts, 5/- (4/26); E. J. Cox, 4/6 (6/26); L. W. Saw, donation, 5/-; A. R. Cohen, advt., 15/-, sub., 4/6 (6/26); A. Ryan, 4/6 (6/26); F. T. Hepworth, 4/6 (8/26); R. B. Bigelow, 4/6 (6/26); G. Collingridge, 4/6 (6/26); N. Gaye, 5/- (7/26); R. Ross, 5/- (5/26); A. M. Hopton, 3/-, 4/6 (6/26); cash sales, 2/4; W. D. Smith, 5/- (7/26); W. E. Hill, 4/6 (6/26); H. Hansen, 5/- (6/26); —. Lamprill, 4/6 (6/26); —. Marshall, 4/6 (6/26); J. Lonergan, 4/6 (6/26); —. Batchelor, 4/6 (6/26); E. F. Heritage, 4/6 (6/26); D. Guilbert, 4/6 (6/26); K. Simmons, 4/6 (6/26); J. Girdwood, 4/6 (6/26); B. Rosengren, 4/6 (6/26); E. J. Lanyon, 4/6 (6/26); L. H. Lanyon, 4/6 (1/26); H. M. Lanyon, 4/6 (1/26); T. H. W. Goessling, 4/6 (5/26); Pikes Bookshop, 12/-; J. Dobrich, 5/- (8/26); E. Ely, 4/6 (6/26); O. Behnken, 4/6 (3/26); G. Gordon, 4/6 (6/26); P. McCabe, 5/4½ (6/26).

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso: Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Chambers, 350 Little Colling-str. vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Gaste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; sekretario, S-ro L. E. Pfahler. Poŝta adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

"Iru Antaŭen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto: S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy 8 horo, merkredo; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkredo vespere je la oka horo.

Raciista Esperanta kaj Diskuto Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie; sekretario, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str. North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str. Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.